Sceno 9

Kanto: "Terura afero..."

Reĝino: Tri kuiras sen ĝeno.
Akrobatas jen kvar,
Unu - apud kameno,
Kontraŭ mur' - plia par'.

Reĝo: Tiu ĉi sur foteloj
Saltas kiel simi'.
Pluraj kuras sen celo,
Sen respekto al mi!

Reĝino: Mia kor'! Miaj nervoj!
Restis neniu flor'!
Ĉiuj akvorezervoj,
Certe tuj estos for!

Reĝo: La palac' en danĝero!

Reĝino: Ili kreskas sen fin'!

Ambaŭ: Ho, terura afero!
Vera plag' trafis nin!
Ho, terura afero!
Vera plag' trafis nin!

*The correlative **ĉiu** and its plural, **ĉiuj**:*

Ĉiu el ni lernas Esperanton. ***Each** of us is learning Esperanto.*
Ni **ĉiuj** lernas Esperanton. *We **all** are learning Esperanto.*

Sceno 10

Reĝo: De kie ili ĉiuj venas ĉi tien?

Reĝino: Rigardu!
Ili ĉiuj venas el la ĉambro de Korvaks.
Li faras ion teruran! Iru tuj! Rapide!

Korvaks: Ĉesu! Ĉesu! Helpu!

Reĝo: Korvaks! Kion vi faras?

Korvaks: Mi faras nenion! Ĉion ĉi faras la komputilo!

Sceno 11

Silvja: Helpu!

Karlo: Aŭskultu!

Silvja: Helpu!

Karlo: Vokas Silvja!

Silvja: Ho, Karlo, mi tre timas!

Mazi: Kial?

Karlo: Kial vi timas?

Silvja: Ĉar estas multaj mi en la palaco.

Karlo: Multaj vi?

Mazi: Pardonu! Ĉu vi kunportis horloĝojn?

Karlo: Nu, Mazi!

Silvja: Jen por vi! Mazi, kial vi manĝas horloĝojn?

Mazi: Ĉar ili estas bongustaj!

Kial? —Ĉar...

Kial Mazi ŝatas manĝi horloĝojn?
—**Ĉar** ili estas bongustaj.

Sceno 12

Petro: Ho, ve! Li ploras. Kial vi ploras?
Knabo: Ĉar mi ne povas atingi la pomon.
Petro: Kial vi ne povas atingi ĝin?
Knabo: Ĉar mi estas malalta.
Petro: Mi atingas ĝin.
Knabo: Jes.
Petro: Kial?
Knabo: Ĉar vi estas alta.
Petro: Jes. Bonvolu.
Knabo: Dankon! Ĝis!
Petro: Hej! Ĝi estas *mia* pomo, kaj *mia* biciklo! Haltu! Haltu! La biciklo estas mia! *(Li kaptas la knabon.)* La bikiclo estas mia!
Knabo: Jes, via!
Petro: Jes, mia biciklo! Nun redonu mian pomon!
Knabo: Mi ne redonos!
Petro: Kial?
Knabo: Ĉar ĝi estas mia!

Sceno 13



Silvja: Ho, Karlo.
Karlo: Multaj Silvjaj... ho, mi scias! Korvaks! Lia komputilo!
Silvja kaj Mazi: Karlo, kien vi kuras?
Karlo: Al la komputilejo! Iru! Sekvu min!

Sceno 1

Denove en la komputilejo: la komputilo kopias multajn Pseŭdo-Silviajn.

Reĝo: Korvaks! Haltigu la komputilon!
Korvaks: Mi ne povas, Via Majesto!
Reĝo: Ho, jes! Vi povas. Ĝi estas via.
Korvaks: Jes, mia! Ĝi estas mia, sed mi ne povas haltigi ĝin.
Reĝo: Do, mi haltigos ĝin! *(al Pseŭdo-Silvja)* Pardonu! Pardonu!
Korvaks: Atentu! Atentu!
Reĝo: Ne timu, Korvaks!
Korvaks: Ne faru tion!
Reĝo: *(en la komputilo)* Korvaks! Korvaks, helpu min!

Sceno 2

En la ĝardeno de la palaco.



Silvja: Rigardu! Alia mi!
Mazi: Kaj unu pli! Kaj tie... estas multaj vi!
Karlo: Rigardu, kiom dika!
Mazi: Tiu alia estas pli dika!
Silvja: Kiom granda!
Mazi: Sed tiu estas pli granda!
Karlo: Venu, Mazi!